

ILEI-konferenco en Afriko - Kial?

Ĉar:

- **Esperanto-agado en Afriko bezonas sian ILEI-dimensionon:**
 - en Afriko estas multaj lernemuloj kaj malmultaj instruistoj de Esperanto
 - instrukapabligho estas prioritata celo de ILEI-agado
- **Esperantistaj instruistoj de Afriko deziras pli firme komunikiĝi kun siaj kolegoj el la tuta mondo por:**
 - spertiĝi pri ILEI kaj lerni el ĝia historio
 - perfektigi siajn lingvokapablojn kaj spertiĝi pri didaktiko
 - plikonatiĝi kun instrumaterialoj, instruhelpiloj kaj rilataj metodoj por E-instruado
- **Afrika Esperantujo povas oferti al la tutmonda E-novado multon, sed:**
 - vojaĝoj al E-aranĝoj en aliaj mondopartoj estas tro multekostaj por esperantistoj el Afriko
 - malmultaj vojaĝoj kaj vizitoj per helpo de amikoj de Afriko ne sufiĉas

ILEI-konferenco en Afriko estos grava evento por Esperanto-movado entute, por historio de ILEI kaj por E-movado en Afriko.

Partoprenu la konferencon por kuraĝigi la samideanojn en Afriko kaj omaĝi iliajn klopodojn por disvastigado de Esperanto en la tuta mondo, kaj helpu ilin partopreni multnombre.



LA 41-a KONFERENCO DE ILEI Benino, Porto-Novo, 2008



INSTRUISTOJ DE ESPERANTO POR LA PLANEDO TERO

Porto-Novo, la vudu-urbo de Benino, gastigonto de Konferenco de ILEI

Instruistoj de Esperanto por la Planedo Tero

La urbo

La nomo *Porto-Novo* certe sonas kutime por esperantistoj, kvankam ĝi originis el portugala lingvo kiam portugalo Eucharistus de Campos, dum sia esplorojaĝo en 1730, rimarkis ke la tiama urbo ege similas al la urbo Porto de Portugalio. La nomo tiel restis eĉ dum kaj post la franca influo. Tamen la multnombra loĝantaro de Porto-Novo ne ofte uzas la portugalan devenvorton, sed *Hogbonu* kaj *Aĝaĉe* laŭ la lingvoj *gun* kaj *yoruba* respektive. Porto-Novo estas oficiale la ĉefurbo de Benino. Ĝi gastigas la parlamenton kaj kelkajn aliajn ŝtataministrejojn.




Ĝi situas apud la

giganta lago kiun enfluas rivero OUEME.

Ĉirkaŭ tridek kilometrojn for de Porto-Novo situas Cotonou, la plej granda kaj ekonomie grava urbo de Benino kun flughaveno facile atingebla el la konferencurbo.

Porto-Novo estas ankaŭ transirurbo al la giganta Niĝerio. Estas preskaŭ neeble ne rimarki la ekziston de la praktiko de vuduo, kiam oni promenas en la urbo de Porto-Novo. Vuduo estas religio por iuj, sed tradicia vivmaniero por aliaj.



Loĝado

Porto-Novo disponigas ĉiusepacajn hotelojn kaj gastejojn sufiĉe taŭgajn ĉu por eŭropanoj ĉu por afrikanoj, laŭ iliaj buĝetoj. Averaĝa kosto de unulita ĉambro

por nokto ĉe sufiĉe luksa

hotelo estas 19 000 fcfa (30 EUR) kaj 13 000 fcfa (19 EUR) por mezluksa hotelo. (1 EUR = 655 FCFA)



Restoracioj

Kiel kutime en multaj afrikaj urboj, en Porto-Novo eblas restoracumi eŭropece, aŭ gustumi afrikajn manĝaĵojn en restoracioj kaj ĉe multnombraj afrikaj manĝejoj relative malaltkoste: ĉirkaŭ 8 000 fcfa (12,5 EUR) tage.



Programo

Por la konferenca programo oni antaŭvidas jam tradiciajn programerojn: solenajn inaŭguron kaj fermon; interkonan, nacian kaj internacian artan vesperojn; internaciajn ekzamenojn de ILEI/UEA en elementa kaj meza niveloj; komitatkunsidojn kaj estarkunsidojn; kaj tiujn kiuj nur iĝas tradiciaj: Simpozio pri konferenca temo kaj Lingva Festivalo. Ne mankos kleriga, kultura kaj turisma programo: seminarioj, specialaj kaj lingvaj kursoj, prelegoj, amuzaj vesperoj, ekskursoj ...

Bonvenas ĉiuj proponoj, sinproponoj kaj sugestoj. Bonvolu skribi al ILEI: info@ilei.info aŭ aidute@mail.lt, aŭ al Afrika Oficejo de UEA afrika.officejo@uea.org. Financa helpo por subvencii partoprenon de kiom eble pli da instruistoj kaj junaj instruemuloj el Afriko bonvenas al la konto ilek-a (ILEI) aŭ al la Afrika Fondaĵo ĉe UEA, kun indiko "Benino 2008".